# *Prezidanto de la Parlamento de Turkio plenumas oficialan viziton al Kubo*

*Image not found or type unknown*




**Foto: PL**

Havano, maj 8 (RHK) La prezidanto de la Granda Nacia Asembleo de Türkiye (Parlamento), Numan Kurtulmu?, alvenis hodia? al Kubo por oficiala vizito, responde al invito de sia ekvivalento Esteban Lazo.

Post lia alveno al la internacia flughaveno José Martí en Havano, li estis akceptita de Ana María Mari Machado, vicprezidanto de la Nacia Asembleo de Popola Povo kaj de la ?tata Konsilio.

La vizitanto, kiu veturis ?e la kapo de parlamenta delegacio de la e?razia nacio, interparolos en la kuba ?efurbo kun Lazo kaj aliaj a?toritatoj, vizitos lokojn de historia kaj kultura intereso, kaj faros aliajn agadojn.

La delegacio de la Granda Nacia Asembleo de Türkiye anka? konsistas el deputitoj Murat Emir; Filiz Kilic; Selman Özboyaci, prezidanto de la Parlamenta Amikeca Grupo kun Kubo; kaj Ahmet Gökhan Sariçam, inter aliaj direktoroj kaj oficialuloj de la le?dona korpo.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/354213-prezidanto-de-la-parlamento-de-turkio-plenumas-oficialan-viziton-al-kubo

**Radio Habana Cuba**